

# Lumo



ISSN: 0827-3154

**2020: UK**  
*en Montrealo*

**ENHAVO | SKIZO**

**Kanadaj novaĵoj 3**

**Raportoj kaj kontribuajoj 19**

**Diversaĵoj 33**

**LIMDATO**

**POR LA VENONTA NUMERO**

**La 15a de novembro 2017**

**[lumo.revuo@gmail.com](mailto:lumo.revuo@gmail.com)**






**Lumo estas la revuo de  
la Kanada Esperanto-Asocio.  
Por membriĝi en KEA,  
vizitu nian [retejon](#).**

## **DETALA ENHAVO DE LA NUMERO**

Redaktorina rubriko . . . . .	1
<b>KANADAJ NOVAĴOJ . . . . .</b>	<b>3</b>
Universala Kongreso: Montrealo 2020 . . . . .	3
Kampanjo de KEA por donacoj . . . . .	9
LangFest en Montrealo – sukcesego! . . . . .	12
Kalendaro de E-eventoj . . . . .	18
<b>RAPORTOJ KAJ KONTRIBUAĴOJ . . . . .</b>	<b>19</b>
MeKaRo – Raporto de Kiara Waters . . . . .	19
Letero de Gilles-Philippe Morin al Yury Jakymec . . . . .	20
Tri poemoj, de Saĉjko Iŝtok . . . . .	32
- Malnova lernejdomo . . . . .	32
- Tri anasidoj . . . . .	32
- Granda lobelio . . . . .	32
<b>DIVERSAĴOJ . . . . .</b>	<b>33</b>
Retejo por enkonduki Balion en esperantujo . . . . .	33
Krucvortenigmo – Solvoj . . . . .	34
Vortludoj por geknaboj . . . . .	35
Kontribuantoj . . . . .	36

# Redaktorina rubriko



«Samideanoj! Jen fulma numero de Lumo!  
Sciigu la grandan novaĵon de la momento!»

**V**i certe aŭdis ke, oficiale, la 105a Universala Kongreso okazos en Montrealo! Legu la detalojn de la novaĵo, eltiritajn de la revuo *La Riverego*. Rilate al tio, por helpi la preparadon de la UK (interalie), la teamo de Lumo kuraĝigas vin partopreni la kampanjon de KEA per donacoj. Konsiderante ke oni bezonas volontulojn kaj entuziasmulojn, mi kuraĝigas

vin diskonigi la lingvon internacian ĉirkaŭ vin, kaj eĉ inviti homojn membriĝi en KEA.

Bona okazo por diskonigi Esperanton estis LangFest, festivalo pri diversaj lingvoj, kiu okazis en Montrealo de la 25a ĝis la 27a de aŭgusto. Artikolo de Nicolas Viau prezentas diversajn informojn pri tiu festivalo.

# Redaktorina rubriko

Someraj E-eventoj jam pasis; mi invitas vin sendi kontribuaĵojn kaj raportojn se vi spertis UK-on, IJK-on, NOREK-on. Komenciĝas aŭtuno; mi partoprenis ARE-on, ĉu vi intencas ĉeesti venontan jaron? Se paroli pri E-eventoj, vi povas legi la raporton de Kiara Waters, kiu ricevis stipendion de KEA por partopreni la pasintan MeKaRo-n en Hamiltono.

Sekve, la granda artikolo de Yury Jakymec, kiu aperis en la numero 2017/2, okazigis respondon de Gilles-Philippe Morin; li diskutas detalan komparon de Esperanto kun Ido. Sur pli poezia noto, Saĉjko verkis tri belajn poemojn, titolitajn Malnova lernejdomo, Tri anasidoj, Granda lobelio.

En diversaĵoj, la (eble?) sola esperantisto de Balio, Indonezio, volas diskonigi sian landon tra esperanta blogo. Vi ankaŭ trovos la solvojn de la pasinta krucvortenigmo kaj novajn vortludojn por geknaboj. Nu, tio estis ja fulma numero!

Bonan legadon,



**Kamila**

[Camille-Amélie Koziej Lévesque]

**Redaktorino**



# KANADAJ NOVAĴOJ



## Universala Kongreso: Montrealo 2020!

(jes, kreu viajn okulojn  
kaj planu veni jam nun!)

**Jes, vi povas kredi viajn okulojn, kaj denove jes, tio estas oficiala:  
la UK-2020 ja okazos en Montrealo !**


Dum la ferma ceremonio de la UK en Seulo UEA anoncis ne unu, sed du sekvajn universalajn kongresojn: en Lahti (Finnlando) en 2019 kaj en Montrealo en 2020. La montreala Loka Kongresa Komitato, kiu havis la kuraĝon inviti kaj laboregos dum la venontaj tri jaroj por sukcesigi tiun ĉi, certe, historian eventon, respondas la demandojn!

## **Kial 2020 ?**

Ĉar «2020» aspektas bele sur la informiloj kaj facilas ĝin memori! :) Bone, nun serioze. La lasta fojo, kiam la UK okazis en Kanado, estis en 1984 en Vankuvero, kaj la lasta fojo, kiam la UK okazis en la orienta parto de Nord-Ameriko, estis en la forjaro 1910 en Vaŝingtono — tiam Zamenhof mem vizitis la kongreson! Ni pensas, ke estas bona tempo rekongresi en la orienta parto de Nord-Ameriko post 110 jaroj, la duan fojon en Kanado post pli ol 30 jaroj kaj la unuan fojon entute en Kebekio! Alia kialo por 2020 estas, ke UEA ĝenerale preferas havi du sinsekvajn eŭropajn kongresojn inter ne-eŭropaj kongresoj — certe ne temas pri strikta normo, sed tamen estas tia prefero. Do, de unu flanko, ni ne volis rompi tiun ritmon, kaj de alia flanko, ni volis havi multe da tempo por senhaste fari ĉiujn preparlaborojn.

## **Tio estas la dua fojo, kiam Montrealo kandidatiĝis por gastigi la UK-on, ĉu ne?**

Jes, ni kandidatiĝis la unuan fojon por tiu ĉi jaro, 2017, ĉar tio estas la jaro de la 150-jariĝo de Kanado kaj de la 375-jariĝo de Montrealo. La malgajno, kompreneble, estis tre malgajiga por ni kaj ĉiuj samideanoj en Kanado kaj Usono, kiuj volis kunfesti tiujn du okazojn ankaŭ per la kanada kongreso. Retrorigardante, tamen, ni pensas, ke la jaro 2020 estas same bona aŭ eble eĉ pli bona, ĉar tio donas al ni pli da tempo por plani, ellabori konceptojn kaj ankaŭ por simple pasigi bonan tempon kaj ĝui la kunlaboron!



Normand Fleury




Garry Evans




Nicolas Viau

## Kiu estas en la organiza teamo?

La kerna teamo konsistas el ses lokanoj. Normand Fleury, la prezidanto de Esperanto-Societo Kebekia (ESK), kiun UEA honoris pro elstara agado dum la UK en Seulo, estas la LKK-estro. Nicolas Viau, vic-prezidanto de ESK, estas ankaŭ la vic-prezidanto de la LKK. Joel Amis, la antaŭa ekzekutiva direktoro de ESF, estas alia vic-prezidanto de la LKK, kiu ankaŭ okupiĝos pri la rilatoj kun la kongresejo. Martin Morris, universitata bibliotekisto, estas la LKK-sekretario. Garry Evans, profesia ekonomikisto, estos nia kasisto. Ĵenja Amis, redaktorino de La Riverego kaj antaŭa redaktorino de Kontakto, okupiĝos pri la rilatoj kun esperantistoj kaj zorgos pri komunikado. Ŝi ankaŭ respondecos pri «frenezaĵoj» — ŝi havas multajn ideojn kaj esperas, ke kelkaj el ili realiĝos. Ni aldonu, ke ni tre ŝatas kunlabori kaj sincere ĝuas ĉiujn niajn kunvenojn!



Joel Amis



Martin Morris



Ĵenja Amis

**Kiu do estas la oficiala invitanto de la kongreso, ĉu KEA — la landa asocio de Kanado — aŭ ESK? Kaj kiuj estas la rilatoj inter ili?**

KEA, la Kanada Esperanto-Asocio, estas la oficiala invitanto; la invito ja venas ĉiam de la landa asocio. ESK estas la loka organiza forto de la evento. La LKK-anoj estas plejparte membroj de ambaŭ organizoj. Ofte la estraranoj de KEA estas ankaŭ aktivaj en ESK kaj inverse. Ni, fakte, tre fieras pri la bonega kaj amika rilato inter KEA kaj ESK, kaj ni ofte kunlaboras pri organizado de eventoj (ekz. la partopreno en la Monda Socia Forumo pasintjare), eldonado (ekz. La Eta Princo), ktp. Do, la organizo de la UK estas jen plia ekzemplo de tia kunlaboro!

**Kiaj estas la rilatoj inter la UK-organizantoj kaj Esperanto-USA?**

La usonaj samideanoj estas niaj plej bonaj amikoj. Ili apogis nin por la kandidatiĝo por 2017 kaj en 2020, per rezolucioj de pluraj urboj favore al la kandidatiĝo de Montrealo, kaj tre multaj usonaj esperantistoj esprimis la deziron kunlabori kaj volontuli dumkongrese. Cetere, la kanadaj kaj usonaj esperantistoj ofte kunkongresas, kaj du el la LKK-anoj (Joel kaj Ĵenja Amis) antaŭe loĝis en Usono kaj membras de jaroj en Esperanto-USA. Do, eĉ se oficiale la invito venas de unu landa asocio, ni intencas, kiel ĉiam antaŭe, multe kunlabori kun Esperanto-USA kaj certigi, ke usonanoj estas parto de la pli larĝa organiza teamo kaj ankaŭ ke usonaj kulturo, muziko, arto, ktp. estos prezentitaj dumkongrese.



**Vi sukcesis akiri la subskribon de la kanada ĉefministro, Justin Trudeau! Kiel? :)**

La Montreala Turisma Oficejo (Tourisme Montréal) helpis akiri ĝin, kaj ankaŭ la aliajn gravajn subskribojn apoge al la kongreso (la ĉefministro de Kebekio, la urbestro de Montrealo, la estro de la flugkompanio Air Canada, ktp.). Ĝi subtenis nin ekde la komenco, kaj vere, sen ili ni ne kapablus fari ĉion, kion ni faris: la vizitojn al la hoteloj kaj kongresejoj, preparon de la provizora buĝeto kaj la tutan plurdekpaĝan kandidatiĝan dosieron. Ni estas treege dankemaj al ili. Niaj amikoj de Tourisme Montréal estas same feliĉaj pri la gajno, kiel ni mem, kaj kelkaj oficistoj eĉ diris, ke ili eble mem lernos Esperanton por 2020!

**La esprimo «20/20» en la angla lingvo signifas perfektan vidkapablon. Ĉu vi intencas fari la «perfektan kongreson»?**

Ni provos! :) Ni havas fortan teamon kaj multegajn ekstreme kapablajn subtenantojn, kaj, kompreneble, ni havas la belegan multlingvan urbon Montrealo, kun riĉa historio, vidindaĵoj, muzeoj, muziko kaj festivaloj. Ni volas montri al esperantistoj el la tuta mondo nian belan urbon, kaj diskonigi Esperanton kaj nian unikan kulturon al montrealanoj. Kaj se perfekteco eble ne vere ekzistas, ni tamen esperas alproksimiĝi al ĝi tiom, kiom ni povos! Kaj ni povas absolute garantii unu aferon: la kongresanoj pasigos belegan tempon kaj ĝuos partopreni la kongreson kaj la ekskursojn en nia rava urbo same multe, kiel ni ĝuas organizi ĝin!

## **Ĉu estas io, kion oni povus fari por helpi en la organizado, ktp?**

Jes! Por fari tian eventon, kiel la UK, necesas multaj volontuloj. Kaj por certigi, ke ankaŭ tiuj, kiuj volontulos, havos la okazon ĝui la kongreson, necesos muuultaj dumkongresaj helpantoj. Ni invitas ĉiujn volontuli ne nur dum nia kongreso, sed ankaŭ dum la antaŭaj kongresoj: ĝi estas tre ĝua sperto, ĉar oni renkontas kaj amikiĝas kun tiom da esperantistoj! Post iom da tempo estos preta la retejo, kaj tie ni havos specialan sekcion por volontuloj. Sed kial atendi? Enskribiĝu jam nun: sendu la mesaĝon al

[volontuloj2020@gmail.com](mailto:volontuloj2020@gmail.com)

(vi povas ankaŭ skribi, kion vi ŝatus fari kaj kial vi ŝatus volontuli; vi ankaŭ povas aldoni vian foton — ni uzos ĝin por la UK-retejo).

Ni bezonos multajn volontulojn ne nur dumkongrese, sed ankaŭ antaŭ la kongreso: ekzemple, tradukantojn (inter la angla aŭ franca kaj Esperanto), homojn, kiuj subtitoligos filmojn aŭ videojn, helpos pri dezajno de informiloj, la ĝisdatigoj al la retejo, ktp. Ni antaŭdankas niajn volontulojn, kaj ni, kompreneble, intencas speciale honori ilin dumkongrese. Se vi ankoraŭ ne faris tion, vizitu kaj ŝatu la [UK-paĝon en Facebook!](#) Kaj kompreneble, ne estas tro frue jam nun plani vojaĝon al Montrealo en 2020 kaj esti parto de tiu historia evento!

Ĝis la revido en Montrealo! :)

### **Loka Kongresa Komitato**

Garry, Joel, Ĵenja, Marteno, Nicolas, Normando


> Eltirita de la revuo La Riverego

## Kampanjo de KEA por donacoj

Kara membro de La Kanada Esperanto-Asocio,

Kiel vi certe scias, UEA akceptis nian inviton okazigi la Universalan Kongreson de 2020 en Montrealo. Ni ĝojas pri tiu unika okazo organizi la plej grandan feston de Esperantujo en nia lando, diskonigi la kanadan kulturon al esperantistoj de ĉie en la mondo, kaj ankaŭ informi pri Esperanto kanadanojn: dumkongrese kaj ankaŭ dum preskaŭ tri jaroj antaŭ la kongreso.

Por fari la prepar-laborojn por nia UK en Montrealo ni bezonas la subtenon de ĉiuj kanadaj esperantistoj, kaj aparte tiun de la membroj de KEA. Ni bezonas vian subtenon financan, en la formo de kotizoj kaj donacoj. Via financa subteno helpas por la produktado de informiloj, reklamoj kaj instru-materialoj antaŭ la kongreso, starigo de inform-budoj dum eventoj, kie kunvenas homoj interesitaj pri lingvoj kaj komunikado, ktp. Unu el tiaj ekzemploj de tiu nia laboro estas nia partopreno en la poliglota konferenco en Montrealo, LangFest, ĉi-aŭguste. Dank' al subteno de KEA, ni havis informbudon pri Esperanto dum la evento kie ni disdonis centojn da informiloj kaj respondis al demandoj de nekalkuleblaj interesitoj. Ni ankaŭ havis reklamon pri Esperanto kaj la UK-2020 en la kongreslibro de LangFest, kaj dum la evento okazis ateliero pri Esperanto, kie plurdek homoj povis lerni la bazojn de nia lingvo. La anglalingva prelego de Chuck Smith pri la kulturo de Esperanto estos baldaŭ havebla en YouTube kaj alirebla al ĉiuj en la mondo. Jen nur eta ekzemplo de antaŭkongresa preparlaboro por kreskigi kaj plifortigi Esperanton en Kanado kaj Nord-Ameriko.



Ni ankaŭ havas grandajn planojn por la venontaj jaroj: refaro de la retejo esperanto.ca, la loko por informi pri Esperanto kaj KEA en Kanado. Ĝi estas aparte grava ĝuste nun, dum ni kampanjas por Esperanto kaj la kongreso, kaj sen tio ni vere ne povas havi profesion rilaton kun la gazetaro. Inter niaj agadoj en la venontaj jaroj estas ankaŭ eldono de Kanada antologio, kaj ankaŭ eventuala invito (aŭ kuninvito, kun Esperanto-USA) de la IJK, t.e. la Internacia Junulara Kongreso.

Alia grava agado de KEA estas havebligo de stipendioj al junaj kanadanoj por partopreno en la eventoj. Ĉar ĉe KEA ni kredas, ke investi en nian junularon estas ege grave por la estonteco de nia Movado, ni regule subtenas junajn kanadanojn por ke ili partoprenu diversajn aranĝojn, ekzemple MeKaRo-n, ARE-on, NOREK-on. Dum la lasta estrarkunsido ni decidis denove komune kunkongresi en 2018 kun niaj samideanoj el Usono, en Seatlo, kaj tio estos plia okazo subteni la partoprenon de kanada junulo en la evento.

Ĉu vi ankaŭ ŝatus subteni la agadon de UEA en la preparado de la plej granda evento en Esperantujo, kiu venas al nia lando nur la duan fojon, kaj al la orienta parto de Kanado la unuan fojon? Donacu al KEA, kun indiko "2020 por 2020". Ni jam kolektis \$450, kaj ni ŝatus kolekti 2020 dolarojn (aŭ pli) ĉi-jare, honore al nia granda jaro. (Donackvitancoj estas haveblaj.)



## Por fari donacon al KEA

bv. sendi ĉekon al nia kasisto ĉe 414-110 Grand Avenue, London ON N6C 1L8

aŭ uzi la retpaĝon [www.esperanto.ca/eo/kea/membreco](http://www.esperanto.ca/eo/kea/membreco)

oni ankaŭ povas donaci rete ĉe [www.canadahelps.org/en/charities/kanada-esperanto-asocio](http://www.canadahelps.org/en/charities/kanada-esperanto-asocio)  
(*angle*)

aŭ [www.canadahelps.org/fr/organismesdebienfaisance/kanada-esperanto-asocio/](http://www.canadahelps.org/fr/organismesdebienfaisance/kanada-esperanto-asocio/)  
(*france*)

Kompreneble, krom la subteno financa, ni bezonas vian subtenon kiel volontulon: por informi niajn samlandanojn pri Esperanto, por instrui nian lingvon al lernemuloj, aranĝi bonajn programerojn por la vizitontoj, gvidi ekskursojn, traduki, registri kongresanojn, helpi bonvenigi la gastojn de la tuta mondo. Tio estas granda laboro, sed laboro ege ĝuinda kaj persone riĉiga sperto. Ĉu ankaŭ vi interesiĝas helpi? Skribu mesaĝon al [volontuloj2020@gmail.com](mailto:volontuloj2020@gmail.com)

**Paul Hopkins, Prezidanto de KEA**  
**Ĵenja Amis, LKK-ano kaj estrarano de KEA**



**La Kanada  
Esperanto-  
Asocio**



## LangFest en Montrealo – Sukcesego!

**Nicolas Viau**, organizteamano de la Montreala Lingva Festivalo, rakontas sian sperton kaj parolas pri la graveco de la evento por esperantistoj kaj lingvemuloj en Kanado. La evento certe estis sukcesego!

De la 25a ĝis la 27a de aŭgusto 2017 okazis la Montreala Lingva Festivalo («LangFest») ĉe Universitato Concordia en Montrealo, kun apogo interalie de la Kanada Esperanto-Asocio kaj Esperanto-USA. Estis la dua eldono de la festivalo, kiu pastintjare nomiĝis «Nordamerika Poliglota Simpozio» (NAPS, mallonge). La Festivalo celas kunvenigi ĉiujn lingvoŝatantojn: lernemulojn, profesiulojn, gepatrojn de multlingvaj infanoj kaj ĝenerale ĉiujn scivolemulojn pri la temo.

Kvankam la pasintjara sukcesis venigi pli malpli 150 homojn, preskaŭ 400 homoj partoprenis almenaŭ iujn programerojn dum la semajnfino. La granda vendreda konferenca vespero – kiun mi detalos tuj poste – kun Bella Devyatkina kaj Stephen Krashen altiris al si proksimume 300 homojn kaj estis la plej ĉeestata programero. Oni do rajtas paroli pri granda sukceso!

## Bunta programo

La programo inkluzivis plurajn jam konatajn – sed ankaŭ plurajn novajn – prelegantojn. Du el la plej famaj, kiuj prelegis dum grava konferenca vespero vendredon (la unuan tagon de la evento) estis Bella Devyatkina, kvinjaraĝa rusa knabino kiu jam parolas 8 lingvojn, kaj Stephen Krashen, unu el la plej elstaraj fakuloj pri lingvoakirado. Ili estis la steluloj de granda konferenca vespero la unuan kongresan tagon.


Bella famiĝis aparte pasintjare, post kiam rusa televidelando, montrante ŝiajn kapablojn paroli diversajn lingvojn, rapide populariĝis tra sociaj retoj. Ŝi venis Montrealen kun siaj gepatroj. Ŝia patrino, kiu profesie estas lingvoinstruisto, detale klarigis dum sia prelego kiel ŝi edukis sian filinon. Tion ŝi faras pere de ludoj kaj diversaj lingvoinstruaj helpantoj. Mirinde, Bella ankaŭ kapablas legi la lingvojn, kiujn ŝi parolas (ŝia patrino instruis al ŝi alfabeton kaj legadon ekde tre juna aĝo).

Alia grava invitito estis profesoro Stephen Krashen. Dum fascina prelego, li – nur per voĉo kaj nigra tabulo – klarigis sian nun faman teorion pri lingvoakirado: «komprenebla enigo» (angle «comprehensible input»). Temas pri la ideo, laŭ li neniam malpruvigita dum sia kariero, ke oni neniam akiras lingvon per konscia, strukturita strebo, sed ĉiam per lingvaj enigeroj, kiujn la lernanto povas kompreni, kutime en kunteksto de forta interesiĝo pri la enhavo aŭ la situacio (povas temi pri rakonto, aparta persono, ktp). Li asertas, ke eĉ en situacioj, en kiuj multaj horoj da klasika instruado okazis, tamen oni devas konsideri, ke fakte lingvo estis vere lernita dum momentoj, kiam la lernanto ne konscie ekzercis sin, sed eksponis sin al la lingvo kaj komprenis la enhavon, tiel iom post iom konstruante propran lingvoscipovon. Tion li argumentis per pluraj ekzemploj de homoj, kiuj akiris lingvon aŭ lingvojn diversmaniere.

Yulia Devyatkina



Stephen Krashen



Tiu teorio tre kongruas kun la vidpunkto de alia grava preleganto – kaj konsilanto de la LangFest teamo – Steve Kaufmann (alia konsilanto estis Olly Richards, kiu estras la retejon «I Will Teach You A Language»). Li mem akiris dekon da lingvoj post la aĝo de 60 jaroj, kaj lia metodo ĉiam estis multe eksponi sin al la celloge kaj aŭde antaŭ ol vere paroli. Lia enreta lingvolerniga sistemo LingQ, kiun li estras kun sia filo Mark, emfazas komprenadon kaj neaktivan ekzercon tra regula kaj ofta eksponiĝo per uzo de lernenhavo, kiu interesas la lernanton. Lernado per «komprenebla enigo» ŝajne rapide fariĝis grava temo de la Festivalo.

Steve Kaufmann ricevis la Premion pri elstareco de LangFest, okaze de la dekjara datreveno de sia aktiveco en la plurlingvema mondo. Gratulon, Steve!

Pluraj aliaj prelegoj ankaŭ kompreneble temis pri lingvolernado, donante al la ĉeestantaro konsilojn kaj teknikojn por pli efike lerni. Interalie oni parolis pri memoro, lernomotivigo kaj pri la personaj spertoj de pluraj lingvolernemuloj. Flanke de tiuj lernecaj temoj, pluraj prelegoj temis pri pli sociecaj aferoj. Ekzemple, mi mem havis la plezuron prelegi pri la lingva situacio de Kebekio el socihistoria vidpunkto – laŭ mia impresado multaj eksterkebekiaj lingvemuloj scivolemas pri la temo – kaj ankaŭ gvidi atelieron pri lingva egaleco kaj povo.




## Esperanto ĉe LangFest

Estis fakte multaj atelieroj dum la Festivalo: enkondukaj kursetoj pri diversaj lingvoj, kiel la itala, la rumana, la mandarena, sed ankaŭ pri aliaj temoj, kiel lingvoinstruado kaj tradukado. Ankaŭ inkluziviĝis enkonduka kurseto de Esperanto, sperte gvidita de Suzanne Roy, kiu uzas lingve neŭtralan gestan instrumentodon, permesante al lingve diversaj partoprenantoj akiri bazajn principojn kaj vortaron de la lingvo aŭdante nur Esperanton!

Plie, estis aliaj Esperantaĵeroj dum LangFest: krom Suzanne Roy kaj mi mem, prelegis la Esperantoparolantoj Lýdia Machová (el Slovakio, kunorganizinto de la evento Polyglot Gathering, okazinta ĉijare en Bratislavo), Tony Harris (kiu repondis demandojn de la publiko post kiam oni montris la filmon «Conlanging», pri planlingvoj kaj ties kreantoj), la fama poligloto Benny Lewis, kaj Chuck Smith, tre konata en Esperantio pro sia aktivado (Vikipedio, Duolingo, Amikumu), kiu ĝuste prelegis pri Esperanto-kulturo.

Ĝuste pri Chuck kaj Amikumu: temas pri apo, kiu permesas trovi apudajn esperantistojn. Ĝi asociiĝis kun LangFest kaj nun lanĉiĝis por ĉiuj lingvoj, aldone al Esperanto, dum la evento (en Montrealo, kaj tuj poste en Kebekurbo, Otavo kaj Toronto)! Amikumu fakte eĉ ricevis la Premion pro novigo de LangFest, fine de la evento kaj nun klare aperas kiel donaco de la Esperanto-mondo al ĉiuj aliaj lingvemuloj. Gratulon al ili!





Tria premiito fakte estis alia parolanto de Esperanto: Benny Lewis, kies elstara agado diversmedie (aparte en sociaj retoj) estis agnoskita per la Premio pri Medioj de LangFest. Gratulon ankaŭ al li!

Plie, estis en la kongresejo Esperanto-budo danke al la malavara subteno de Kanada Esperanto-Asocio kaj Esperanto-USA por prezenti Esperanton! La tablo certe helpis videbligi Esperanton. Homoj povis preni varbilojn kaj ankaŭ malkovri erojn de Esperanto-kulturo danke al la libroj kaj revuoj, kiujn oni eksponis, kaj kompreneble danke al homoj, kiuj afable parolis al vizitantoj pri la lingvo! Mi aparte dankas al Ĵenja kaj Joel Amis, tre aktivaj Montrealaj esperantistoj, pro ilia afabla akcepto deĵori kaj informi homojn ĉe la tablo dum la semajnfino.



### Lingvopontoj

Flanke de la oficiala programo, la partoprenantoj kaptis okazon malkovri Montrealon kaj ĝiajn diversajn vindindaĵojn, inkluzive la Reĝan Monton, la Malnovan Havenon kaj la Latinan Kvartalon. Oni esperas, ke ekstermontrealaj vizitantoj povis malkovri la kulturan diversecon kaj lingvan kuirarton de la urbo, aparte okaze de ĝia 375a datreveno!

Tiaj eventoj estas do bonegaj okazoj krei ligojn ne nur inter lingvemuloj sed ankaŭ pontojn inter esperantistoj kaj la plurlingvema komunumo. Ŝajne pli kaj pli da poliglotoj nun interesiĝas, eĉ foje lernas (novaj instrurimedoj kiel Duolingo helpas, sed verŝajne ne nur tio) aŭ almenaŭ scias pri Esperanto. Aliflanke, kiel ni scias, multaj esperantistoj estas mem lingvemuloj kaj ŝatas ĉeesti tiajn kongresojn. Oni nuntempe povas tie relative facile trovi parolantojn de Esperanto. Ankaŭ estis bona momento por videbligi Esperanto-organizojn. La subteno de la Kanada Esperanto-Asocio (kaj de Esperanto-USA) estis agnoskita en la kongresa libreto per logotipoj kaj ankaŭ dum la tagaj malfermaj kaj fermaj alparoloj, samtempe kiel aliaj sponsoroj.

La retejo de la evento estas:

<http://montreal.langfest.org/>

La prelegoj estis filmitaj kaj haveblas ĉe la [YouTube-kanalo de LangFest](#).

Fotistino: Daniela Miranda

## **Kreskanta rolo de Montrealo**

LangFest intencas fariĝi kutima Montreala evento, okazante jaron post jaro. Oni jam anoncis la daton de LangFest 2018: de la 24a ĝis la 26a de aŭgusto, kaj jam pli ol 70 homoj aĉetis bileton nur 5 tagojn post la evento!

La granda sukceso de la evento helpas videbligi Kanadon, kaj aparte Montrealon, kiel taŭgegajn lokojn por lingvaj eventoj (tiaj eventoj jam okazas en Eŭropo, malpli ofte en nia kontinento), kie multo okazas rilate al lingvoj kaj kulturoj – grava afero, kiam oni pensas pri la 105a Universala Kongreso en 2020 en Montrealo! Mi cetere kaptis okazon mencii UK-on dum la ferma ceremonio kaj la libreto inkluzivis reklamon pri ĝi – la unua papera reklamo pri nia UK!

Ĉio tio helpas rekte aŭ nerekte konatigi la landon, la urbon kaj Esperanton. Estas do interese epoko por aktiviĝi pri tiaj temoj!

Ĝis la venonta jaro!

pasintaj

## Kalendaro de venontaj eventoj

**22 - 29 julio**

[102a UK](#) en Seulo, Koreio

**5 - 12 aŭgusto**

[73a IJK](#) en Aneho, Togolando

**19 aŭgusto**

[Paralela Universo](#), Tutmonde

**22 - 24 septembro**

[NOREK](#), Viktorio, Brita Kolumbio, Kanado

**7 - 9 oktobro**

[ARE](#), Silver Bay, Usono

**Lumo serĉas  
kontribuantojn!**

Rakontu viajn  
E-eventojn kaj sendu  
raporton ĉe  
[lumo.revuo@gmail.com](mailto:lumo.revuo@gmail.com)

## Kalendaro de venontaj eventoj

Lokalaj renkontiĝoj



**15 decembro**

Zamenhofa festo



# RAPORTOJ KAJ KONTRIBUAĴOJ

## MeKaRo – Raporto de Kiara Waters

Mi partoprenis mian unuan MeKaRon lastatempe en Hamiltono, kaj ĝi estis tre amuza afero. Mi renkontis multajn esperantistojn afablajn. Mi estis iomete fama, ĉar mi estas novulo. Mi ne vere scias kion diri; la semajnfino estis ege interesa. Ni rondiris malnovan batalŝipon (nomatan HMCS Haida) kaj aŭskultis kelkajn rakontojn. Ni promenis kaj aŭskultis pli da rakontoj dum fantoma promeno. Iu diris al mi, ke laŭ la esperantistoj fantomaj promenoj estis pli popularaj sep jarojn antaŭe. Ni manĝis kune, kaj ĉiu babilis. Ĉiuj babilis dum ĉio, kion ni faris. Ĉiam mi aŭdis rakontojn. Mi ne sufiĉe scipovas Esperanton por rerakonti ilin ĉi tie. Vere la rakontoj estis aferoj pri kio kaj kie ili okazis.

Tamen, mi scipovas sufiĉe por rakonti ion, kio okazis je la lasta nokto de la semajnfino. De tempo al tempo ĉe Esperanto-Konversacio por Komencantoj en Toronto mi maltrankviliĝis pro tio, ke mi ne havis vortaron sed devus. Do, kiam mi vidis, ke iu — Yves Bellefeuille — vendis kelkajn librojn, inkluzive vortarojn, mi aĉetis unu. Amike, li donis senkoste al mi libron en la angla pri la vivo de Zamenhof. Dum la semajnfino li diris multajn fojojn, ke la libroj estas pezaj, kaj ke li ne volas kunporti ĉiujn hejmen. Laŭ mi tio estis afabla, kaj mi ŝatas la libron pri Zamenhof.

Mia unua MeKaRo estis interesa, kaj la urbo bela. Plejparte la bona afero estis la homoj kaj la rakontoj — aĵoj pri kiuj mi ne bone scipovas rakonti ĉi tie. Espereble ĉi tio sufiĉas por esprimi la opinion de nur unu novulo pri Esperantujo. Mi rimarkis, ke esperantistoj estas la plej afablaj homoj, kiujn mi iam ajn renkontis.



## Letero de Gilles-Philippe Morin al Yury Jakymec

Reago al la artikolo *Planlingvoj!*

**K**ara Sinjoro!  
Mi dankas vin pro via artikolo en la revuo *Lumo* pri planlingvoj<sup>1</sup>. Ĉar mi plej interesiĝas pri Ido, kiun mi studas de ĉirkaŭ kvar jaroj, mi plej atente legis la paĝon 18 de *Lumo* el via verko.

En ĝi, oni trovas la jenan frazon:


«Ĝia leksiko ŝanĝiĝis malmulte, kun ioma influo de la franca.»

Pli aŭ malpli kiel Esperanto mem, Ido estas lingvo tre kalumniita kaj kalumniata. Bedaŭrinde, ofte aperas akraj kritikoj de homoj, kiuj eĉ ne komprenas la lingvon — ekzemple, multaj asertas, ke oni tute forigis la akuzativan kazon en Ido, aŭ ke ĝi fariĝis nedeviga. Tial mi volas provi klarigi aŭ korekti la informojn pri tiu lingvo kiu ja ludis gravan rolon en la historio de nia kara lingvo.


Post kvar jaroj de studado, mi devas konfesi, ke mi estas en dubo pri tio, ĉu la franca vere pli influis la leksikon de Ido ol alia lingvo. Fakte, mi faris liston de vortoj en Esperanto kiuj estas pli «francecaj» ol tiuj, kiujn oni trovas en Ido. Vidu mem:

---

<sup>1</sup> Vidu ĉe *Lumo*, numero 2017/2, p. 14-24, aŭ (sen plibonigoj) ĉe lia [retejo](#).



<b>Esperanto</b>	<b>Franca</b>	<b>Ido</b>	<b>deveno de la Ido-vorto</b>
aĉeti	acheter	komprar	itala kaj hispana
afero	affaire	kozy	itala kaj hispana
anonci	annoncer	anuncar	itala kaj hispana
atendi	s'attendre	expektar	angla
atuto	atout	trumpo	germana kaj angla
beni	bénir	benedikar	latina
buklo	boucle (de cheveux)	loklo	germana kaj rusa
buŝo	bouche	boko	itala kaj hispana
ĉano	chien (de fusil)	hano	germana
ĉar	car	nam	latina
ĉarpenti	charpenter	karpentar	latina
ĉemizo	chemise	kamizo	hispana
ĉerko	cercueil	sarko	germana
ĉevalo	cheval	kavalo	itala
ĉifi	chiffonner	krumplar	angla
detrui	détruire	destruktar	latina
devi	devoir (nécessité)	mustar	angla
dimanĉo	dimanche	sundio	germana kaj angla
diri	dire	dicar	latina
diveni	deviner	divinar	latina
ekspluati	exploiter	explotar	hispana
enketo	enquête	inquesto	hispana



<b>Esperanto</b>	<b>Franca</b>	<b>Ido</b>	<b>deveno de la Ido-vorto</b>
etendi	étendre	extensar	latina
evolui	évoluer	evolucionar	hispana
fermi	fermer	klozar	angla
foiro	foire	ferio	hispana
fojno	foin	feno	latina
ĝis	jusque	til	angla
gorĝo	gorge	fauco	itala kaj hispana
grimpi	grimper	klimar	germana
honto	honte	shamo	germana kaj angla
ĵaŭdo	jeudi	jovdio	latina
kaŝi	cacher	celar	latina
kero	coeur (cartes)	kordio	latina
klera	éclairé (instruit)	instruktita	latina
kolero	colère	iraco	latina
koni	connaître [connais]	konocar	itala kaj hispana
kraĉi	cracher	sputar	itala kaj hispana
kudri	coudre	sutar	latina
kuiri	cuire	koquar	latina
laca	las, lasse (fatigué)	fatigita	angla, franca, itala, hispana
larmo	larme	lakrimo	itala kaj hispana
lui	louer (prendre à loyer)	lokacar	latina
luigi	louer (donner à loyer)	lugar	hispana






<b>Esperanto</b>	<b>Franca</b>	<b>Ido</b>	<b>deveno de la Ido-vorto</b>
maĉi	mâcher	mastikar	angla, franca, itala, hispana
mem	même	ipsa	latina
metio	métier	mestiero	itala
naĝi	nager	natar	latina
neĝo	neige	nivo	latina
parkere	par coeur	memore	itala kaj hispana
planko	plancher	pavimento	itala
plej	le plus (superlatif)	maxim	latina
plonĝi	plonger	plunjar	angla
preta	prêt, prête	pronta	itala kaj hispana
prononci	prononcer	pronuncar	itala kaj hispana
rampi	ramper	reptar	latina
remburajo	rembourrage	polstero	germana
ronĝi	ronger	rodar	itala
ruĝa	rouge	reda	angla
salajro	salaire	salario	itala kaj hispana
semajno	semaine	semano	hispana
soifo	soif	dursto	germana
sopiri	soupirer	sospirar	itala
suĉi	sucer	sugar	germana
terni	éternuer	sternutar	latina
terpomo	pomme de terre	potato	angla

<b>Esperanto</b>	<b>Franca</b>	<b>Ido</b>	<b>deveno de la Ido-vorto</b>
tigo	tige (d'une plante)	stipito	itala kaj hispana
tolo	toile	telo	itala kaj hispana
turno	tour	turmo	germana
tuta	tout	tota	latina
vendredo	vendredi	vernedio	itala
viando	viande	karno	itala kaj hispana
violono	violon	violino	germana, angla, itala, hispana
voĉdoni	voter [donner sa voix]	votar	germana, angla, franca, itala, hispana
vualo	voile (tissu)	velo	itala kaj hispana

Kvankam tiu ĉi listo ne estas plena, mi esperas, ke ĝi sufiĉe klare montras, ke Ido forprenis plurajn francismojn de Esperanto kaj anstataŭigis ilin precipe per latinismoj kaj germanismoj. Fakte, la novaj radikoj aldonitaj al la vortaro devenis aŭ de la latina, aŭ de unu (aŭ, prefere, pli ol unu) el la ses «fontlingvoj», t.e. oni ĉerpis el la germana, la angla, la franca, la itala, la rusa kaj la hispana.

Sed ne nur la francismoj estis viktimoj de tiu latinigo kaj germanigo: ankaŭ la esperantismoj kaj vortoj ne internaciaj. Kiel vi skribis en la artikolo, ZAMENHOF mem konsideris la verkojn de la logikisto COUTURAT kaj eĉ aprobis lian celon forigi esperantismojn kiel «elrigardi»<sup>2</sup>.

<sup>2</sup> «La esprimon «vidiĝi» anstataŭ «elrigardi» mi trovas tute bona. Mi esperas, ke iom post iom ĉiuj idiotismoj malaperos kaj cedos sian lokon al esprimoj tute logikaj kaj internaciaj.» — [L. L. Zamenhof, Septembro 1905](#)



Tiel «alfari», «almiliti», «elparoli», «elrigardi», «plenkreskulo», «pli-olunu» k.t.p., anstataŭiĝis per la latinecaj *adaptar*, *konquestar*, *pronuncar*, *aspektar*, *adulto*, *plura*, k.t.p. La termino «norda cervo» [Ndir NPIV, p.190, proponas la vorton 'rangifero' anstataŭ ĉi tiu termino, kiu tradukas la anglan vorton 'reindeer' kaj la francan 'renne'], kiu ŝajnas esti paŭso de la rusa (северный олень), anstataŭiĝis per rentiro, el la germana. Tamen oni jam komencis fari similajn ŝanĝojn en Esperanto, antaŭ kaj post la Fundamento. Ido simple plue forigis — kaj forigas — tiajn idiotismojn, kiam oni konsideris, ke ili ĝenis lernadon aŭ interkomprenon.

Jen pliaj ekzemploj. La vorto «knabo», kiu devenas de arĥaika germana vorto, anstataŭiĝis per la latineca *puero*. La latinecaj «anaso», «ansero», «ezoko», «fringo», «hidrargo», «krabro», «melo», «pediko», «peti», «sed», «visko» kaj «vulpo» anstataŭiĝis respektive per *anado*, el la hispana, *ganso*, el la germana kaj hispana, *lucio*, el la itala kaj hispana, *daxo*, el la germana, *merkurio*, el la itala kaj hispana, *horniso*, el la germana, *finko*, el la germana, *lausos*, el la germana, *pregar*, el la itala, *ma*, el la itala, *mistelo*, el la germana, kaj *foxo*, el la angla. La vorto «kaj», el la helena, anstataŭiĝis per *e(d)*, el la itala. La fina morfemo «-i», kun duba deveno, anstataŭiĝis per *-ar*, el la itala kaj hispana. La plurnombra «-oj», el la helena kaj eble ankaŭ el la latina, anstataŭiĝis per *-i*, el la itala. La vorto «leontodo», kun duba deveno, anstataŭiĝis per *leon-dento*, idiotisma konstruaĵo kiun oni trovas en la angla, la germana, la hispana, la itala, la latina, la norvega, la portugala, kaj jes, ankaŭ en la *svisa franca*. La vorto «lakso», ankaŭ kun duba deveno, anstataŭiĝis per *diareo*, el la latina. La vortoj «birdo», «boato» kaj «teamo», ĉiuj el la angla sed verŝajne elektitaj por esti legataj anstataŭ aŭdataj, anstataŭiĝis per *ucelo* (el la itala), *batelo* (el la itala) kaj *esquado* (el la angla kaj, jes, la franca). Entute, la franca ne ŝajnas esti influinta pli ol eĉ la itala.



Nu! Mi nun demandas vin: kie estas la «ioma influo de la franca»?

Certe mi ne intencas diri, ke la franca havis *neniom* da influo en Ido. Mi pli ĝuste volas montri, ke ĝi ne influis pli ol aliaj lingvoj. Ĉar mi ŝatas vidi la problemon el la du vidpunktoj, tial mi ankaŭ provis fari liston — kiel eble plej plenan — de vortoj en Ido kiuj estas pli «francecaj» ol tiuj, kiujn oni trovas en Esperanto. Vidu mem:


<b>Ido</b>	<b>Franca</b>	<b>Esperanto</b>	<b>deveno de la Esperanto-vorto</b>
agulo	aiguille	nadlo	germana
amendo	amende	monpuno	derivaĵo
arachar	arracher	elŝiri	derivaĵo
arozar	arroser	akvumi	derivaĵo
ateliero	atelier	metiejo	derivaĵo
-atr-	-âtre (qui tire sur cette couleur)	dube-	???
bersar	bercer	luli	angla
boneto	bonnet (tuque)	ĉapo	pola
bufar	bouffer (gonfler)	ŝveli	germana
chera	cher (coûteux)	kara	itala
dejunar	déjeuner	matenmanĝi	derivaĵo
demarŝar	faire des démarches	klopodi	rusa
dentelo	dentelle	punto	???
dindo	dinde	meleagro	latina

<b>Ido</b>	<b>Franca</b>	<b>Esperanto</b>	<b>deveno de la Esperanto-vorto</b>
echopo	échoppe	budo	germana kaj angla
enregistrar	enregister (avec un appareil)	registri	angla kaj itala
-ed-	-ée (contenu)	plen-	germana kaj angla
-ez	-ez (impératif)	-u	???
fuzeo	fusée	raketo	germana kaj rusa
gondo	gond	pordhoko	derivaĵo
grelo	grêle	hajlo	angla
-ier-	-ier (arbre qui porte le fruit)	-uj-, -arbo	???, derivaĵo
-ier-	-ier (support)	-ing-	???
jolia	joli(e)	beleta	derivaĵo
klaudikar	boiter [claudiquer]	lami	germana kaj angla
klefo	clé (de serrure)	ŝlosilo	germana
komendar	commander	mendi	latina
kurta	court, courte	mallonga	derivaĵo
kustar	coûter	kosti	germana, angla, itala, hispana
lanjo	lange (d'enfant)	vindo	germana
leda	laid, laide	malbela	derivaĵo
lor	lors de	en la tempo de	kunmetaĵo
mem	même	eĉ	???
mi-	mi-	duon-	derivaĵo






<b>Ido</b>	<b>Franca</b>	<b>Esperanto</b>	<b>deveno de la Esperanto-vorto</b>
miniona	mignon, mignonne	beleta	derivaĵo
moyeno	moyen	rimedo	???
mutono	mouton	ŝafo	germana
nula	nul (aucun)	nenia	???
pansar	panser (une plaie)	vindi	germana
par-	par- (accomplissement total)	el-	???
petrisar	pétrir	knedi	germana kaj angla
repasto	repas	manĝo	derivaĵo
savar	savoir	scii	latina
siflar	siffler	fajfi	germana
suciar	se soucier	zorgi	germana
tarino	tarin	fringelo	latina
tauro	taureau	virbovo	derivaĵo
tupio	toupie	turbo	???
unglo	ongle	ungo	latina
visar	visser (une vis)	ŝraŭbi	germana
vizar	viser (avoir pour but)	celi	germana
vu	vous (singulier)	vi	rusa



Dum en Esperanto la vorto «kara» havas du sencojn (koran kaj monan), la vorto *kara* en Ido estas nur kora, kaj la vorto *chera* heredas la monan sencon. Dum la vorto «vi» en Esperanto estas ne nur plurnombra sed ankaŭ ununombra [NdlR, ekzistas kompreneble la ununombra formo 'ci', kiun oni malofte nun uzas], la vorto *vi* en Ido estas nur plurnombra, kaj la vorto *vu* heredas la ununombran sencon, kiel *li* (ili) kaj *lu* (ri aŭ ĝi), *omni* (ĉiuuj) kaj *omnu* (ĉiu), *uli* (iuj) kaj *ulu* (iu), k.t.p. Oni ŝanĝis plurajn derivaĵojn per -um- ĉar oni juĝis, ke ili ne estas sufiĉe klaraj. (Parenteze, dum Esperantujo decidis tute ŝanĝi la sencon de sia derivaĵo «komunumo», la idistaro inklinas adopti la novan radikon *komunitato*. Tiel oni povas vidi la du diversajn pensmanierojn.) Dum io *miniona* kutime estas io iom pli malgranda aŭ pli delikata, io *jolia* estas io iom pli bela, sen tamen esti tute bela. La vorto *repasto* esprimas unu el la ĉefaj manĝoj de la tago (matenmanĝo, tagmanĝo aŭ noktomanĝo), dum la vorto *manjo* (manĝo) en Ido esprimas nur la agon manĝi. Fine, dum la vorto «zorgi» en Esperanto havas sencon pri atento kaj agado, kaj alian sencon pri maltrankviliĝo, la vorto *sorgar* en Ido estas nur pri atento kaj agado, kaj la vorto *suciar* heredas la sencon pri maltrankviliĝo. Tial iuj asertas (prave aŭ malprave), ke Ido estas lingvo pli «nuanca» ol Esperanto.

Ido ankaŭ preferis anstataŭigi plurajn mal-vortojn per novaj radikoj el la ses fontlingvoj. Tiel «maljuna», «malkara», «malmola» kaj «malvarma» anstataŭiĝis per *olda*, *chipa*, *harda* kaj *kolda*, el la angla. La vortoj «malfrue» kaj «malrapide» anstataŭiĝis per *tarde* kaj *lente*, el la franca, la itala kaj la hispana. La vortoj «malalta», «mallevi», «malriĉa» kaj «malsana» anstataŭiĝis per *basa*, *abasar*, *povra* kaj *malada*, el la franca kaj la itala. La vortoj «malplej» kaj «malpli» anstataŭiĝis per *minim* kaj *min*, el la latina. La vortoj «maldekstra» kaj «mallonga» anstataŭiĝis per *sinistra* kaj *streta*, el la itala. La vortoj «malforta», «mallaŭdi», «malnova» kaj «malsimpla»




anstataŭiĝis per *febla*, *blamar*, *anciena* kaj *komplexa*<sup>3</sup> el la angla kaj franca. La vorto «maldika» anstataŭiĝis per *dina*, el la germana kaj la angla. La vorto «malmulta» anstataŭiĝis per *poka*, el la itala kaj la hispana. La vortoj «malgrasa» kaj «malofta» anstataŭiĝis per *magra* kaj *rara*, el la germana, la angla, la franca, la itala kaj la hispana. El la tabelo, la vortoj *kurta* (mallonga) kaj *leda* (malbela) venas el la franca. Tiel la franca ŝajnas ne esti pli influanta ol la angla pri mal-vortoj.

Kompreneble, ĉiuj tiuj ŝanĝoj movis radikojn kaj kreis konfliktojn. Tiel «kosti» fariĝis *kustar* pro konflikto kun *kosto* (ripo), el la itala. La vorto «punto» fariĝis *dentelo* pro konflikto kun *punto* (punkto), el la itala kaj hispana. La vorto «vindo» fariĝis *lanjo* pro konflikto kun *vindar* (vinĉi, el vinĉo), el la germana. La vorto «raketo» fariĝis *fuzeo* pro konflikto kun *raketo* (rakedo), el la angla, la franca, la itala, la rusa kaj la hispana.

El mia vidpunkto — t.e., kompreneble, tute subjektive — la plimulto da vortoj «francecaj» en Ido (krom la gramatikaĵoj) estas malpli ĝeneralaj kaj malpli oportunaj por troviĝi tiel ofte, kiel tiuj en Esperanto. Komparo inter la du tabeloj montras tion. En Esperanto, tre oportunaj estas la vortoj «aĉeti», «afero», «atendi», «buŝo», «ĉar», «ĉemizo», «devi», «dimanĉo», «diri», «fermi», «ĝis», «honto», «ĵaŭdo», «kaŝi», «kolero», «koni», «kuiri», «laca», «mem», «plej», «preta», «ruĝa», «semajno», «soifo», «tuta», «vendredo» kaj «viando». En Ido, tre oportunaj estas *chera*, *dejunar*, *enregistri*, *jolia*, *klefo*, *kurta*, *kustar*, *leda*, *mem*, *miniona*, *moyeno*, *nula*, *repasto*, *savar*, *suciar*, *vizar* kaj *vu*.

---

<sup>3</sup> Zamenhof mem uzis «kompleksa», laŭ la Plena Ilustrita Vortaro.



Sume, mi ne trovas pli da francismoj en la vortaro de Ido ol en tiu de Esperanto, sed mi trovas pli da ili en la gramatiko: pronomo *vu*, prefiksoj *par-* kaj *mi-*, sufiksoj *-atr-*, *-ed-* kaj *-ier-*, fina morfemo *-ez*. Tamen, kiam oni konsideras, ke la franca, la itala, la hispana kaj eĉ kelke la angla estas tre latinaj lingvoj, tuj iĝas klara, ke la latina kaj la germana estas la du plej influantaj lingvoj ĉe Ido. Tial mi konkludas, ke la jena frazo estus pli ĝusta:

«Ĝia leksiko ŝanĝiĝis malmulte, kun ioma influo de la latina kaj germana.»

Tamen, tiu influo latina kaj germana estas nun ĉefe historia, kaj nun la angla ŝajnas havi pli kaj pli da influo : *averaĵo* (meznumero), *buldozero* (skrapmaŝino), *ĉifĉafo* (ĉifĉafo), *emo* (celo), *fuelo* (bruligaĵo), *futbalo* (piedpilkado), *ganeto* (sulo), *gulfo* (golfo), *hobio* (ŝatokupo), *jazo* (ĵazo), *kidnapar* (forrabi), *komputero* (komputilo), *kruo* (ŝipanaro), *ofseto* (platpreso), *potato* (terpomo), *radaro*, *sandwicho* (sandviĉo), *smartfono* (saĝtelefono), *swichilo* (ŝaltilo), *toalo* (bantuko)... Laŭ mi, bona ekzemplo de tio estas la vorto *portar* (porti) kiu, kiel en Esperanto, havas i.a. la signifon «surhavi». Por apartigi tiun sencon de la aliaj, oni serĉas novan radikon. Dum oni tre bone povus ĉerpi *gerar* el la latina *gerere* aŭ *tragar* el la germana *tragen*, la idistaro — ĝis nun — ŝajnas preferi... *werar* el la angla *to wear*!

Kun kora saluto, via  
G.-Ph. MORIN  
Lundon la 14<sup>an</sup> de Aŭgusto 2017.

# Tri poemoj

## Saĉjko Iŝtok

### Malnova lernejdomo

Preskaŭ forgesite staras eta lernejdomo  
En nekonata angulo de la mondo.

Longe antaŭe infanoj kuris ĉirkaŭ ĝi  
Kantis ĝoje, ĉagrenis sian vivon  
Esperis ion bonan, kaj revis estonton.

Kie ili nun?  
Nur la sonorilo scias.

Ombro de pasinteco ĉirkaŭas ĝin.



### Tri anasidoj

En krepuska lageto  
Tri junaj anasoj serĉas sian patrinon  
Kien, Panjo, vi foriris?  
Iel panike rondiras la tri  
En krepuska lageto



### Granda lobelio

En aŭtuna sunbrilo fiere blua  
Aro da lobelioj ĝuas sian belecon

Se papilioj ne rimarkas ilin  
Ne gravas, ĉar ili scias sian belecon

La vivo estas tro mallonga por plendi  
Vivu, ĝuu la vivon donatan





# DIVERSAĴOJ

Saluton,

Mi nomiĝas Pande Sri Santhakumara. Oni nomas min Pande. Mi estas el Indonezio kaj mi loĝas en Gianyar, Balio, Indonezio.

Ĝis nun, estas ankoraŭ nur unu persono en Balio, kiu jam estas membro de Indonezia Esperanto-Asocio (IEA), UEA kaj TEJO. En Balio, ankoraŭ ne ekzistas Esperanto-klubo.

Mi mem ankoraŭ lernas la lingvon. Do, por diskonigi Esperanton en Balio, mi havas planon krei retejon. Tamen, pro la kotizo, nun nur blogon mi jam kreis.

Mi deziras ke ĉi tiu retejo ne nur diskonigu Esperanton al legantoj (speciale en Balio) sed ankaŭ enkonduku Balion en Esperanto.

Se vi volas viziti Balion, mia frato kaj mi povas ĉiĉeroni vin. Bonvolu kontakti nin ĉe

[info@bali-melali.com](mailto:info@bali-melali.com) aŭ +62 81 337 83 83 83.

[www.bali-melali.com](http://www.bali-melali.com)

Koran dankon.

Bonan legadon.

<https://kembangjenar.blogspot.co.id>

Pande

ANTIKAVA EGIPTUJO

<sup>1</sup> B	A	T	A	L	Ĉ	<sup>2</sup> A	R	O	<sup>3</sup> N		<sup>4</sup> S		<sup>5</sup> N	I	L	O		<sup>6</sup> F	
A						F			U		U		E				<sup>7</sup> B	A	
L		<sup>8</sup> S	I	S	T	R	O		B		P		F				A	R	
S						I			I		R		E				S	A	
A						<sup>9</sup> K	L	E	O	P	A	T	R	O			T	O	
<sup>10</sup> M	U	<sup>11</sup> M	I	O		O							T				E	N	
A		A										<sup>12</sup> D	I	N	A	S	T	<sup>13</sup> I	O
D		L					<sup>14</sup> H					T						B	
O		S		<sup>15</sup> H	I	E	R	O	G	L	I	F	O	J		<sup>16</sup> S		I	
		U						R							E			S	
		P					<sup>17</sup> T	U	T	A	N	Ĥ	A	M	O	N		O	
		R						S							E				
	<sup>18</sup> P	A	P	I	R	U	S	O					<sup>19</sup> D	E	Z	E	R	T	O

**Transen:**

1. Militan vehiklon (2-radika kunmetaĵo)
5. La rivero
8. Sankta klakilo
9. Fama reĝino

10. Konservitulo

12. Patro kaj prapatroj
15. Lingvaj signoj
17. Knaba reĝ'
18. Antikva papero
19. Sabla lando

**Malsupren:**

1. Preparado de mortintulo
2. La kontinento
3. Antikva Sudano
4. Suda regiono estis tia
5. Fama reĝino

6. La reĝa moŝto

7. Dia kat'
11. Norda regiono estis tia
13. Vadbirdo
14. Dio de ĉielo
16. Tabullud'



# VORTLUDOJ POR GEKNABOJ DE JASON DONEV

# VORTA SERĈO: BESTOJ

Printu tiun paĝon por provi la vortan serĉon!



Saluton, mia nomo estas  
Francina Fiŝo.

Esperantaj enigmoj plaĉas al mi.  
Ĉu enigmoj plaĉas ankaŭ al vi?

Mi kaŝis vortojn  
en la kvadrato.

Se vi povas, trovu la vortojn!



Amike,

Francina la Flava Fiŝo

O	B	Ĉ	E	F	O	P	S	L	K	Ĵ	O	O	Z	P	S
D	O	H	O	R	O	T	E	C	B	A	V	T	I	P	O
N	V	K	P	L	L	O	R	P	P	R	T	N	A	K	N
U	O	A	I	V	G	N	P	E	E	A	G	O	O	R	I
H	K	R	Z	U	A	G	E	C	C	V	P	K	P	P	V
R	O	A	M	E	B	I	N	Ŭ	E	A	I	I	R	Ĝ	T
G	V	R	O	U	L	C	T	N	P	N	L	J	L	F	Ŭ
N	U	A	P	N	S	E	O	Ĵ	O	R	G	I	T	I	O
O	L	N	S	A	O	O	F	O	L	K	I	N	U	K	O
N	P	E	M	C	N	E	B	A	L	E	N	O	H	K	A
I	O	O	Z	A	B	D	L	O	N	S	I	M	I	O	Ĉ
V	E	O	N	E	Z	A	O	P	K	T	O	P	U	L	I
O	K	A	V	I	O	N	J	G	S	R	O	Ĵ	Ŭ	U	U
B	S	Z	N	V	A	U	R	S	O	O	O	Z	U	M	J
O	P	F	P	R	D	Ŭ	F	K	I	I	S	P	L	S	Z

AGLO

ANASO

ARANEO

AZENO

BALENO

BOVINO

BOVO

CERVO

CIGNO

ELEFANTO

FOKO

GORILO

HUNDO

KAPRO

KATO

KAVIO

KOKINO

KUNIKLO

LACERTO

LEONO

LUPO

MUSO

PANDO

PAPILIO

PINGVENO

PORKO

RANO

RATO

SERPENTO

SIMIO

URSO

VULPO

Nu. Ĉi tie finiĝas la revuo.  
Komentu ĝin, skribu al ni, sendu kontribuaĵojn,  
kaj atendu la venontan numeron de Lumo!

**Redaktorino:** Kamila Koziej Lévesque

**Enketisto:** Geoffrey Greatrex

**Provlegantoj:** Bob Williamson, Geoffrey Greatrex, Francisko Lorrain,  
Gilles-Philippe Morin

**Kompostado:** Kamila Koziej Lévesque

**Kontribuantoj:** Loka Kongresa Komitato Montrealo 2020, Paul  
Hopkins kaj Ĵenja Amis, Nicolas Viau, Kiara Waters, Gilles-Philippe  
Morin, Saĉjko, Pande Sri Santhakumara, Trevor Brown, Jason Donev